

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la
Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B
Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio.
✉ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas
nur post tujantaŭa averto per telefono.)
Elektronika poŝto:

<don@enkidu.dialix.oz.au>

Correspondence Courses: John
Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230,
Matrville NSW 2036, Aŭstralio.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi
elkovertigis vian novan ekzempleron de
Esperanto sub la Suda Kruco: “Ni vere
bezonas artikolon pri...?” Do sendu tiun
amatan eseon, ideon, rakont(et)on, espri-
mon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon,
foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur
komputila disko (Macintosh aŭ MS-
DOS— nur 3.5-cola) aŭ sur papero. Se vi
sendas sur papero: la teksto devas esti
klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur
nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra
spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn
manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi
tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj
korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj
konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi
tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti
mallongigita. Ni ne povas promesi aper-
igon en la tuj sekvonta numero, krom se
temas pri io kronologie urĝa. Pri la
enhavo de artikolo respondecas nur ĝia
aŭtoro.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

P.O. Box 313, Sunnybank Qld 4109

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe
St, Balmain NSW 2014

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St,
Sunnybank Qld 4109

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell
Way, Bentley WA 6102

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland
1035

Prezidanto: David Rockell, 5-71
Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ✉
09-270 3669

Sekretario: Brad McDonald, P.O. Box
8140, Symonds St, Auckland 1035. ✉
kaj faksoj: 09-579 4767

Kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140,
Symonds St, Auckland 1035

Pri abon- kaj membro-kotizoj, vidu paĝon 27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Falsa Pasporto (Donald Broadribb).....	3
Pri la mortigo de Esperanto (Ronald Gates).....	10
Pri publika parolado (Bill & Betty Aulsebrook).....	13
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	15
Participado (Marcel Leereveld).....	18
Rikolto de strangaj vortoj (Donald Broadribb).....	21
Diversaĵoj.....	22
Korektoj, Ŝanĝo de ekspedanto, Marcel Leereveld, Internet, Alan Turvey, Brian Currie, 82a UK en Adelajdo, Sidneja Esperanto-Societo, Kunveno en Master- ton, Paul Desailly.	

Libroj:

<i>Veneno Kara</i> (Elvie Rowe).....	7
<i>Morto de Sciencisto</i> (Vera Payne).....	8
<i>La Floroj de l’Krepusko</i> (D.Broadribb)....	9

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la marta
numero: 17 februaro.

Esperanto sub la Suda Kruco estas leg-
ebla per la Internet. Adreso:
[http://www.dialix.com.au/~peterb/esk/ind
ex.htm](http://www.dialix.com.au/~peterb/esk/index.htm)

FALSA PASPORTO

Rakonto de Donald Broadribb



Igorj Sitnikov

u vi havas strangajn spertojn? Mi supozas ke jes, kvankam estas malfacile supozi ke io pli stranga ol la ĉisekvaĵo iam okazis en la mondo. Verŝajne vi ne kredos min,

do mi pretas montri al vi pruvdokumentojn, se vi insiste petos ilin.

Antaŭ deko da jaroj mi partoprenis en Internacia Kongreso de Jungaj Analizistoj en Zuriko, Svislando. Tiaj kongresoj okazas ĉiun trian jaron, sed antaŭe mi mem neniam partoprenis. Mi ne prelegis, nur aŭskultis kaj, kompreneble, aktivis en la diskutoj. La suma kosto de la partopreno estis iom alta por mi, kaj la lukso de la hotelo ne estis kiom mi preferus por tiom da mono, sed mi ĝuis la ferieton kiu ebligis al mi denove esti en Svislando dum ne-longa tempo.

Revenante al Aŭstralio mi haltis dum kvar semajnoj en Usono, por viziti parencojn kaj amikojn kaj—mi konfesu—ankaŭ por turisti iom ĉe famaj lokoj al kiuj mi neniam iris dum mi loĝis en Usono. La Granda Kanjono estis unu tia loko, kaj mi multe ĝuis la vidaĵon de la Kanjono mem, kvankam la turisteco de la nacia parko apud la Kanjono ĝenis min. Mi jam kutimiĝis al la kvazaŭ-pura netuŝiteco de la mondvidindaĵoj en Aŭstralio, kaj estis forgesinta la komerciĝon de naturaj spektakloj en Usono. Tamen, nun mi vidis tiun

“Okan Mirindaĵon de la Mondo”, kaj tio kontentigis min. Efektive, mi emas nomi ĝin la “Unua Mirindaĵo de la Mondo”, ĉar ĝi ekzistis longe antaŭ ol la homfaritaj “mirindaĵoj” ekzistis.

Jam fraŭlo de aro da jaroj, ĉar mi ankoraŭ ne reedziĝis post la morto de mia unua edzino, mi sentis min izola kaj soleca. Tiun senton pligrandigis la amaso da turistoj kiujn mi ĉiudirekte trovis. Ja ili konsistis preskaŭ nur el paroj, kelkaj samseksaj sed plejparte ne, kaj kvantego da infanoj emfazis ilian familian karakteron. Ofte mi volis reiri al hotelĉambro kaj plori.

Tial neatendite multe plezurigis min trovi konaton inter la turistoj. Li estis jam maljuna, liaj manoj tremis, kelkfoje li parolis nerapide, kvazaŭ spertinte hemoragieton en la cerbo, sed lia menso restis razoklinge klara. Li ankoraŭ konservis aŭtoritatan mienon, kaj mi facile rekonis en li tiun aktivulon kiu serioztonis per la “Voĉo de Ameriko” dum la ardado de la Malvarma Milito en la 1950’oj. Kiel ofte troviĝas ĉe maljunuloj, li volonte parolis pri tempoperiodoj delonge pasintaj. Ĉiokaze li preskaŭ tuj ekparolis pri kiam mi unue renkontis lin—laŭ lia vidpunkto: kiam li unue renkontis min, dek-iom-jaran knabeton, dum mi turiste rigardadis la salonegojn de la nove konstruita sidejo de UN en Novjorko.

“Ĉu vi estas sola ĉi tie?” mi demandis lin, delikate atendinte ĝis li finis sian voĉigon de amataj memoroj. Ne eblis ke li vere estas sola, ĉar

korpe li ja ne povus veturadi sen helpo. Sed mi ĝentilis.

“Min akompanas mia filino kaj ŝiaj du filinetoj,” li respondis. “Mia filino ŝoforas, kaj bonvole petis min prizorgi la idetojn. Tiel ŝi ŝparas monon, kompreneble, ĉar ŝi ne bezonas dungi infanzorganton, kaj ŝi povas liberigi diversfoje por eskapi de la infanoj dum kelkaj horoj.” Li ridis, nelaŭte kaj nelonge, pro sia ŝercemo: “Nu, eble la filinetoj estas la avozorgantoj,” li komentis. “Sed mi ĝuas ilin, kaj ili ne estas tro postulemaj.”

“Ĉu tre junaj?” mi demandis.

“Dekjara kaj okjara,” li diris. “Nu, jen, mi volas peti ion. Ne hezitu diri ‘ne’, se vi ne volas akcepti.”

“Volonte mi amuzos la infanojn, se vi volas ripozi,” mi diris. “Ĉu tion vi celas peti?”

“Ne. Ion tutan alian. Mi volas prunti al vi edzinon por du tagoj.”

Nepre mi misaŭdis. Mi montris mian nekomprenon. “Vi volas pruntepreni mian edzinon dum du tagoj?” mi demandis. “Sed ŝi mortis jam antaŭ pluraj jaroj.”

“Vi misaŭdis,” li diris. “Mi ne volas pruntepreni de vi, mi volas pruntedoni al vi. Nekutima prunto, mi agnoskas. Sed gravas. Jen: se mi ne eraras, vi reflugas al Aŭstralio ventontsemajne, ĉu?”

“Je-e-es,” mi diris iom hezite.

“Nu, mi bezonas pruntedoni al vi edzinon por la flugo. Ŝi ne ĝenos vin. Vi kaj ŝi nur devos geedzumi dum kelkaj minutoj antaŭ la flugo, dum la flugo, kaj ĝis foriro el la flughaveno en Perto. Post tiam vi ne revidos ŝin.”

“Kial?” mi demandis suspekto-plene. “Ĉu ŝi kaŝe kunportos narkotajojn?”

“Tute ne,” li diris. “Nenion tian. Efektive, ŝi kunportos nenion. Ŝi havos neniajn valizojn. Nur sian kutiman mansaketon—kion ŝi kontroligos ĉe la doganejo en la flughaveno de Perto. Ankaŭ nenion ŝi kunportos enkorpe. Ni...mi bezonas ke ŝi transdiru tre gravan komunikaĵon al iu en Aŭstralio. La publikaj komunikiloj estas nesufiĉe kaŝaj, kaj pluraj nacioj kontrolas la persatelitan komunikadon, do nur perpersona komuniko sufiĉos.”

“Ĉu vi ne povus sendi registritan leteron?” mi demandis. “Vi povas fidi la Aŭstralian poŝton, ĉu ne?”

Li ridis. “Ne tiom naiva vi povas esti. Krome, ankaŭ la Usona poŝt-servo ne estas senlime fidebla. Nu, se vi volas rifuzi, do rifuzu. Mi serĉos alian personon por helpi min.”

Kiam antaŭ tiam personoj, plejfoje nekonatoj, petis min kunporti ion dum veturo al fremda lando, ĉar “oni ne povas fidi la poŝton”, mi ĉiam rifuzis. Teruris min filmetoj kiujn mi vidis pri kion faras fremdaj registaroj al turistoj naive kunportantaj narkotajojn por renkontitoj. Sed ĉi tiun maljunan amikon mi konis, kaj estis malfacile kredi ke li kontrabandas tiaĵojn. Li ja dum multaj jaroj estis intima amiko de altranguloj en la Usona registaro. Verŝajne temis pri ia ŝtata sekreto. Alivorte, spionado. Tiu penso vigligis mian imagon. Estus vera aventuro. Kaj certe nenia danĝero ekzistus por mi, en Aŭstralio. Do, eble tre naive, mi akceptis.

Mi pravis, nenia danĝero.

Post tiu konversacieto mi ne revidis mian maljunan amikon. Sendube liaj nepinetoj prizorgis lin, aŭ li ilin. Mi pluveturis al Chicago, kie mi

vizitis konatojn en la Universitato de Chicago. Nenio nekutima denove okazis al mi, ĝis mi atingis la flughavenon el kie mi aeroplanos al Aŭstralio. Mi demandis al mi ĉu mia nova "edzino" montriĝos, ĉar nenion pri tiu afero mi vidis nek aŭdis. Sed mi jam kutimiĝis al spionrakontoj, do min ne surprizis ke tuj antaŭ ol mi trairis la pordojn de la flughaveno, virino paŝis al mi.

"Don," ŝi voketis, "jen mi, ĉi tie."

"Mia edzino, sendube," mi ŝercetis. "Pardonu, sed...mi ja ne konas vin. Ĉu vi bonvolos montri al mi vian pasporton?"

Kvazaŭ atendinte tion, ŝi tuj prenis el sia mansako familiaraspektan bluan pasporton Aŭstralian kaj transdonis ĝin al mi. Mi malfermis la pasporton kaj legis. Jen, sur la dua interna paĝo, ŝia foto—klara kaj neflata, kiel ĉiuj pasportfotoj. Kaj informoj pri ŝi: Joan Broadribb, naskita Joan Greene, 17/3/34 en Wilmington, Delaware. Aŭstralia civitano. Mi komparis la validigan daton de la pasporto, la sama dato kiel sur mia pasporto. Kaj la pasportnumero estis sama kiel la mia plus 1, do validigita tuj post mia pasporto. Ankaŭ la vizo por Usono portis la saman daton kiel en mia pasporto. Evidente iu tre zorge informiĝis pri mia pasporto, kaj sukcese falsis ĝemelan pasporton por ŝi. Sed mi trovis neniun indikon pri falsiĝo en ŝia pasporto. 'Verŝajne,' mi pensis, 'mia maljuna amiko aranĝis kun la Aŭstralia registaro ke la Aŭstralia pasportoficejo faru aŭtentikan pasporton por ŝi, aŭtentikan pasporton kun malveraj nomo, dato, numero, vizostampo.'

Tio trankviligis min iomete. Se ĉi tiu virino estas spiono por Usono kaj ankaŭ oficiale aprobita de la Aŭstralia registaro, ne povas ekzisti danĝero por mi. Tiom naiva mi estis tiutempe.

"Se vi pretas, Joan, ni trinku tason da kafo kaj poste enaviadiliĝu." Mi redonis al ŝi la pasporton, kaj surlipe kisis ŝin, kion ŝi volonte reciprokis.

Brakenbrake ni paŝis al la registrotokontoro, kie mi transdonis mian flugbileton kaj miajn valizojn al komizino. Joan ŝovis sian bileton sur la mian. Dum ŝi komentis al la komizino ke ŝi ne havas apartajn valizojn, ĉio mia kaj ŝia estas en la samaj, mi kaŝrimarkis ke ambaŭ niaj biletoj estis venditaj de la sama vojaĝagentejo, je—laŭ la surstampaĵo—la sama dato. Agentejo en Perto. Nekredeble zorge preparita falso (ĉu?) por identigi Joan kiel mian edzinon. Jam de kiom da monatoj mia maljuna amiko kaj liaj kolegoj planas ĉi tion? Kial ili elektis min? Kaj kiel?

Mi demandis al Joan, sed ŝi, fidele al sia rolo, nur respondis ke kompreneble ni havas preskaŭidentajn biletojn, ĉar ni ja kune mendis kaj aĉetis ilin ĉe la vojaĝagentejo en Perto, ĉu ne? Amuzite pro tiu respondo, mi plu demandis ĉu ŝi memoras kiam ŝi unue renkontis min. Ŝi diris ke ŝi neniam forgesos. Estis dum mi, 23-jara, vizitis mian patrinon en Wilmington, kie mia patrino dum kelka tempo laboris en hospitalo. Mia patrino, kaj mi, kaj ŝi mem kune rigardis la Du Pont-familian domegon. Tion ŝi brilokule "memorigis" al mi. Ŝia memoro estis tre korekta, nur—malgranda "nuro"

—mi neniam renkontis Joan en Wilmington nek aliloke, kaj mi kun mia patrino peraŭte rigardis solaj tiun domegon.

Nu, brakenbrake Joan kaj mi promenis al kafejo proksima al la biletkontoro kaj trinkis kafon. Post tio, ni trairis la magnetradian kadron senevente. La pasportkontrolisto rigardetis niajn pasportojn kaj redonis ilin al ni senkomente.

En la aviadilo, en la ekonomipaŝagera sekcio, ni trovis niajn seĝojn kaj sidiĝis. La flugo estos longega; du nelongaj haltoj antaŭ ol atingi Perton. Kion diri pri tiu veturo? Ni kondukis kiel ordinara geedza paro. Mirigis min kiom Joan sciis pri mi kaj pri mia enaŭstralia vivo. Malmulton ekstran ŝi diris pri si. Tio ne mirigis, ĉar ja se ni estus geedzoj, ni kunvivintus dum multaj jaroj kaj estus samajn eventojn kaj konatojn spertintaj. Bonege ŝi aktorus en kinoflmo, ŝi preskaŭ konvinkis eĉ min ke ŝi estas mia multe amata edzino, duonpatrino de miaj nun adoltaj infanoj.

Ĉu mi volonte havus ŝin kiel mian veran edzinon? Mi ankoraŭ demandas al mi tion. Laŭaspekte ŝi estis al mi tre plaĉa. Ŝiaj brunaj haroj, iomete griziĝintaj, kaj brunaj okuloj bone komplementis miajn (tamen multe pli grizajn) harojn, kaj okulojn. Eĉ ŝia vizaĝo ne multe malsimilis al la mia. Tio mirigis min, ĉar mia unua, vera, edzino aspektis tre simila al mi, kaj ofte oni miskredis nin gefratoj. Ŝiaj vestoj estis samrangaj kiel la miaj: strikta blugiĝnzo, T-ĉemizo palflava kaj iom senkoloriĝinta pro troa sunumado, plastaj sandaloj kun pseŭdokaŭĉukaj pland-

umoj. Tipa Aŭstralia sinvesto, kvankam mi ial suspektis ke neniam antaŭe ŝi vizitis Aŭstralion. Tion mi opinias, ĉar dum ŝi enue trafolumis la Qantas-gazeton trovitan en la seĝopoŝo antaŭ ŝi, ŝi plurfoje komentis pri la aspekto de geografiaj kies fotoj inspiris artikolojn.

Sed spirite? Ŝi plezuroplene kaj plezurige ŝercetis, neanticipite kisetis min kiam mi fariĝis ial tro seriozmiena, ludeme palpis min kvaŭzaŭ jam de longe konanta la tuŝplezurigantajn regionojn de miaj brakoj, kruroj... Kaj jes, komplezeme ŝi akceptis, plurfoje invitis, mian reciprokon. Ni bone geedzadis.

Tamen, finfine, kiel oni povas scii ĉu alia persono farus kun oni mem feliĉan geedzan paron, sen provi kaj sperti ĝian realiĝon? Mi ne tre sukcese taksis la estonton de miaj antaŭaj edzecesperoj, do eble la sorto kiu reartigis min kaj Joan pravis.

Nu, post tiom da filozofiado, sendube vi volas scii pri la lasta fazo de mia aventuro.

La tridek horoj da flugado, kun nur du unuhoraj haltoj, lasis nin ambaŭ tre deziremaj denove dormi en komforta lito, kion mi mem faris ne tujsekve.

Ni trairis la doganejon senincidente. Oni ne ekzamenis la mansakon de Joan, kaj nur tre supraĝe miajn valizojn. Post kelkaj minutoj ni estis en la por-enlanda parto de la flughaveno. Aŭto ŝoforata de amiko mia renkontos min por veturigi min al mia domo.

Antaŭ ol ni atingis la ĉefpordon de la flugterminalo, Joan diris al mi "Momenton; mi uzos necesejon." Ŝi iris al pordo apud kontoro, rapide

malfermis ĝin kaj eniris. Surprizis min ke sur la pordo estis neniu afiŝo, nenia identigo. Mi atendis tujapud la pordo.

Post eble du minutoj, tri uniformitaj policistoj proksimiĝis al mi. “Doktoro Broadribb,” diris unu el ili al mi. “Ni deziras paroli kun via edzino.”

Ĉu? Eble incidento, aŭ io pli grava ol nura incidento, tamen ja okazos.

“Ŝi estas en la necesejo,” mi diris, indikante la pordon. “Sendube ŝi re-eliros baldaŭ.”

“Necesejo? Ne tio,” diris komizino

kiu ĝis tiam rigardis interesate nin. “Tio estas nur stokoŝranko.” Ŝi malfermis la pordon kaj ni enrigardis. La ĉambreto estis preskaŭ malplena, nur tri aŭ kvar lignaj tabletoj estis en ĝi. Neniu persono. Kaj neniu alia pordo nek fenestro en la muroj.

La uniformitoj forvadis. Evidente ili ne fervorege serĉis mian “edzinon”.

Kaj ŝin mem, Joan, mi neniam denove vidis.

Kiel mi jam unue diris, stranga, nekomprenbla sperto.

[La ĉisupra rakonto estas fikcia.-db]



VENENO KARA

recenzas Elvie Rowe



Veneno Kara, tr. Grace Kirkwood, red. Donald Broadribb. Beverley (WA): Bookleaf Publishing, 1995. \$27.50 de la Libroservo de AEA.

Jen libro ĝuebla sur kelkaj niveloj: pro la potenca historio kaj la vivaj personoj kaj la detala bildo de la vivo kaj epoko el kiuj evoluis nia propra socia medio.

Ĉiu libramanto havas siajn plej preferatajn librojn kaj titololistojn de la infanaĝo. Multaj el miaj favorataj verkiĝis en la lingvo de fremda lando kaj oni tradukis ilin tiom sukcese ke mi sentas min loĝi en tiu alia loko.

Veneno Kara estas tia libro. Unue verkita de Mary Webb, kiu uzis la idiomon de Ŝropŝiro kiam okazis la militoj de Napoleono, la libro estas tradukita lerte de Grace Kirkwood kaj poste reviziita de aliaj Esperantistoj.

La militoj estas for kaj apenaŭ

rimarkataj de la malrapida, sezon-regulata socio kiun ni rigardas per la okuloj de Pru Sarn. Ni ekkonas ĝiajn superstiĉojn, partoprenas ĝiajn festojn, toleras ĝiajn antaŭjuĝojn kaj vivas inter ĝiaj strangaĵoj. Ni sentas la komforton apud la kuirejkameno dum la frostaj vintroj kaj ĝuas la revenantan varmon de la printempo kaj somero, kiam en la arbaro, lago kaj kampoj svarmas agado kaj kanto.

La Ŝropŝiranoj apenaŭ konsciis pri la malproksima milito, kaj ili malpli konsciis la disrompiĝon kiu baldaŭ ŝanĝos ilian ŝajne sensanĝan ekziston. Multaj nomiĝis pro siaj metioj aŭ lokoj: tiel ni akiris niajn proprajn familiajn nomojn, ekzemple “Muelisto”. Ili kultivis siajn malgrandajn bienojn, uzis kio ajn eblis el sia produkto kaj vendis bazare la pluson. Ili drapo fariĝis el la felo de iliaj kelkaj ŝafoj, ŝpinita de la virinoj kaj

teksita de migra teksisto.

Sed Pru kaj Gideon Sarn estis inteligentaj junuloj kiuj spirite etendiĝis preter sian limigitan soci-
on. Pru lernis legi kaj skribi, ekster-
ordinaraj artoj tiam por knabino. Tiel
ŝi povis forgesi la malbenon de sia
leporlipo kiam ŝi retiriĝis al la man-
sardo por pensi pri sia vivo kaj verki
sian taglibron. Gideon, tamen, kon-
statis kiel li povos uzi la sekvojn de
la militoj por sia avantaĝo. Liaj altaj
ambicioj kaj la freneza agado de la
mentoro de Pru kombiniĝis por de-
trui iliajn vivojn kaj la vivojn de la
homoj plej apudaj.

La romano havas la formon de
aŭtobiografiaĵo de la ĉefrolulo, Pru.

Pru rakontas teruran historion. Ĝi
tenegas la leganton pro sia severeco
kaj sia maljesteco, dum ĝi daŭras ĝis
neevitebla tragedia fino. Ŝi rakontas
pri maldolĉa laboro kaj amara sen-
esperigo sed kun tiom da amo kaj
kompato ke oni miras pro ŝia elteno.
Ŝi meritas la feliĉon kiun finfine ŝi
trovas. Oni esperas ke tiu feliĉo daŭ-
ros tra la epoko de la Enfermoj kaj de
la Industria Revolucio. Tia forta,
prudenta virino sendube migrus kun
sia familio al la Aŭstraliaj kolonioj.

[Noto de la redaktoro: ĉi tiu libro
estas normal-Esperanta versio de la
verko kiu aperis en dialektigita for-
mo sub la titolo *Malbeno Kara* en
1994.] □



MORTO DE SCIENCISTO



Recenzas Vera Payne

Morto de Sciencisto, de Ronald
Cecil Gates. Antverpeno: Flandra
Esperanto-Ligo, 1994. 81p., broŝur-
ita. \$11.50 de la AEA Libroservo.

Legantoj de *ESK* jam konscias ke
krimrakontoj ĝenerale ne estas mia
preferata taso da teo. Sed la ĝenerala
homaro verŝajne englutas ilin dank-
eme kaj konstante soifas por pli.

Ronald Cecil Gates ne aspiras al
erudiciaj volumoj. Laŭ mi estas do-
maĝe, ĉar lia literatura kapablo
neniel pridubindas. Precipe li lertas

kadavro! Iom laŭ la **Derek**-stilo (kun
ĉefo kaj lerta, pli juna, subulo), la
rakonto meandras tra marĉejeto de
enketoj koncerne taĉmenton da sus-
pektatoj. Enuigis min la plataj
karakterizaĵoj. Plej malplaĉe, man-
kas klarigo pri la murdo-kialoj. Mi
atendis kontentigan, detaloplenan ri-
velon, emocipurigan por la kulpulo,
de ŝ/liaj pravigoj. Vane.

Mia interesiĝo ekflagretis je la
vortoj “remaĉulaj mikroboj”. Ĉar Ron
Gates bone utiligas la ĝenron por

precizigi detalojn per ampleksa
vortostoko.

La formato de *Morto de Sciencisto*
plaĉas. Troviĝas utila listo de la
Personaro ĉe la komenco—verdire
necesa, ĉar enestas 17 roluloj krom la

komentarii pri la aktuala socistato,
eble post nelonge aperos krimromano
pri kuniklo-mortiga viruso kiu eskap-
as siajn homajn kreintojn kaj la
insulan medion kie ĝi ne tre efike
enkarceriĝis... □



LA FLOROJ DE L'KREPUSKO



Recenzas Donald Broadribb

La Floroj de l' Krepusko, de Sergo Elgo. Romano originale verkita en Esperanto. Prilly (Svislando): Kooperativo de Literatura Foiro, 1995. 168p., broŝurita.

Talenta aŭtoro, bone planita intrigo, interesa stilo—la ingrediencoj de verko kiun oni anticipus esti bonkvalita detektivo-/spiono-romano.

Kiam mi komencis legi la libron, min tre allogis la komencaj ĉapitroj, kaj mi anticipis tre bonan legaĵon. Sed ve! Post la unuaj kelkaj ĉapitroj la aŭtoro komencas prelegi al la legantoj pri sia favorata politika-sociologia temo, kaj la legintereso rapide malaperas.

Propagandromanoj malofte sukcesas, kaj ĉi tiu deradike malsukcesas. Kial la aŭtoro ne verkis sociologian, aŭ politikan, eseon por publikiĝo en *Literatura Foiro*, aŭ eble *Survoje*, por ke ni povu legi libroforme verkon kiu

sen tiaj longaj propagandaj tekstoj estus bone konstruita kaj tre leginda rakonto?

La politika-sociologia prediko mem, kiu daŭras nemaskite multajn paĝojn, temas pri la kaŭzoj de la fiasko de Marksismo kaj la demando ĉu la valoroj de modifita Marksismo povus reformuliĝi en la kadro de pli humanisma, socialista – demokratia reĝimo. La socia fono de la diskuto estas, kompreneble, la Orient-Eŭropa “ekskomunista bloko”; tamen, kvankam kelkaj detaloj estas specife Orient-Eŭropaj, la diskuto havas ĝeneralan aplikeblecon en la moderna mondo. La diskuto estas bone verkita, kaj la literatura fono—eventoj en la romanintrigo—estas trafa.

Ĉi tiun romanon ĝuos nur la spirite fortikaj. Kiel mi supre diris, estas domaĝe. □

RECENZANTO SERĈATA

por nove eldonita libro *Survoje al Universala Civilizacio*, originale verkita en Esperanto de Giordano Moya Escayola, eldonita en Barcelono, 1995. 205p., broŝurita. Vi povas ricevi la libron recenzocela de la redaktoro de *ESK*.



Desegnita
Igorj Sitnikov

PRI LA MORTIGO DE ESPERANTO

De Ronald Gates

Multe interesis min la plendo de Marcel Leereveld pri nenecesaj neologismoj kaj la komentoj de Donald Broadribb tiurilate (“Kiu mortigas Esperanton inside”, *ESK* Nov.-Dec. 1995). Miaopinie, tia diskuto vivigas la paĝojn de nia organo, kaj devus okazi pli ofte.

Mi ne povas ne konsenti kun la du kleraj diskutantoj kiam ili bedaŭras la senbridan enkondukon de novaj radikoj. Tamen ŝajnas al mi ke ili ambaŭ pretervidis unu gravan punkton, nome ke Esperanto plenumas pli ol unu funkcion. Interalie, ĝi estas kaj praktika ĉiutaga komunikilo, kaj perilo por pli pene ellaborita verkado.

Por la ĉiutaga uzado, ĉu parola, ĉu skriba, necesas komuna stoko da radikoj vaste sciataj. Memevidente ili devas esti nombre limigitaj.

En verkado, male, ĉu scienca, ĉu beletra, ĉu por nura intereso aŭ distro, oni bezonas pli diversan vortostokon, pro almenaŭ du kialoj. Unue, la ideoj esprimendaj estas ordinaraj pli kompleksaj kaj postulas pli da precizeco, ol tiuj pri kiuj temas konversacio aŭ simpla korespondo. Kaj due, la ripeto de radikoj, kvankam allasebla en ĉiutaga komunikado, ofte raras en pli pretendaj skribaĵoj. Oni do penas variigi la vortelekon, uzante sinonimojn kaj preskaŭ-sinonimojn.

Tia situacio okazas ankaŭ rilate naturajn lingvojn. Unuflanke ni havas vortoriĉan leksikonon (notu ke mi evitis la ripeton de la radiko *vort*), el kiu la verkanto povas elekti jen unu radikon, jen sinonimon de ĝi, aŭ laŭ

sia bontrovo per iomete alisenca esprimo nuanci la tekston. Ĉe la alia flanko ni havas multe malpli grandan aron—ĉu oni povas diri “subaron”? la vortoj kiuj uziĝas en ĉiutagaj rilatoj. Tamen, se temas pri la naturaj lingvoj, neniu oficialigas neologismojn: la vortaroj nur rekonas ilin, post kiam ili estas sufiĉe vaste uzataj. Egale, neniu dekrete decidas kiu el pluraj samsignifaj vortoj meritas lokon en la ĉiutaga leksikono: tiun decidon faras kolektive kaj senkonscie la uzantaro.

Ŝajnas al mi ke efektive ĉilasta jam okazas rilate Esperanton. Kial do ni ne lasu ke nia ĝenerala, pli ampleksa leksikono kresku laŭ la idiosinkrazioj de la diversaj verkantoj, sen bridado? Kial okupiĝi pri oficialigo? La respondo troviĝas en du gravaj punktoj per kiuj Esperanto malsimilas al naturaj lingvoj, nome ke ekde la komenco, por plej bone servi kiel universala helplingvo ĝi celas unuformecon kaj facilan lernadon. Pro tio la gramatiko estas sen neregulaĵoj kaj oni penas, per la uzo de afiksoj kaj kunmetaĵoj, limigi la kreskadon de la radikaro.

(Fakte, kiel demonstris Marcel kaj Donald, ĉilastan celon la oficialiga sistemo ne tute atingis. Rilate gramatikon mi aldonu ke, unuavide, mi inklinis subteni Marcelon kiam li bedaŭris la enkondukon de *fare de* kaj *far*: ili ŝajnis ankaŭ al mi nelogikaj, kaj mi rigardis ilin kiel sennecese aldonantajn al la nombro de la reguloj kiujn la komencanto devas lerni. Tamen pli atenta legado de ilia

praviĝo en *PIV* kiel prepozicioj duonpersvadis min. Ĉiaokaze ili estas firme asimilitaj; kaj mi konfesu ke mi de tempo al tempo uzas ilin por variigo.)

Kion, do, ni faru pri neologismo, kiam ĝi okazas sen konvinka kialo? Kompreneble, ni devas laŭeble malinstigi la kulpulojn. Tiucele, ni ne uzu en propra verkado la superflujajn enkondukaĵojn, eĉ se ili estas oficialigitaj, ĝis ili atingos (se iam) tre ĝeneralan uzon fare de aliaj. (Ekzemple, malgraŭ la prefero de nia estimata redaktoro, mi ankoraŭ ne nomas aŭtoremizon *garaĝo*—tiu termino cetere povas signifi ankaŭ riparejon.)¹ Kaj, probable pli efike, do pli grave, ni sekvu la ekzemplon de Marcel kaj Donald kaj per citado atentigu la Esperantistaron pri tio kion iuj, manke de kontesto, faros al nia lingvo.

Komentoj de Donald Broadribb:

Mi plejparte akordas kun Ron. Li tre klare kaj konvinke prezentas sian vidpunkton. Permesu ke mi menciu kelkajn punktojn kiuj—miaopinie—bezonas tamen specialan atenton:

(1) En la naturaj lingvoj nia lingvo estas konstante korektata. En la lernejoj (kaj la universitatoj) la instruistoj senĉese korektas—parole kaj skribe—nian gramatikuzon, nian vortelekton, nian stilon. Ofte ili prav- as, ofte ne. Sed ĉiam ili korektadas. Kiam ni sendas verkaĵon por publikigo, eĉ se nur leteron al la redaktoro de ĵurnalo, la redaktoro kaj la kom-

postisto ŝanĝas la tekston, parte por korekti ĝin, parte por konformigi ĝin al la kutimoj de la periodaĵo aŭ eldonejo, parte tre arbitre. Ni ofte malplezuras pro tio, sed tia tekstoŝanĝado estas universala kaj monolite forta, en la naturaj lingvoj.

Kontraste, en Esperanto, tre malofte oni parolas aŭ skribas sufiĉe por ke korektoj alvenu. Oni povas misuzi la gramatikon aŭ vortostokon dum jaroj tute sen esti korektata, dum en natura lingvo tia korekto okazus jam kiam ni la unuan fojon misuzas la lingvaĵon. Tial niaj parolantoj kaj verkantoj devas multe pli zorge kontroli la propran lingvuzadon—ĉar neniu alia faras tion por ni.

La rezulto estas ke niaj eldonaĵoj suferegas pro malalta lingvonivelo. Mi konas nur unu regionan periodaĵon Esperantan en Aŭstralio kiu ne plenplenas de gramatikaj, vortuzaj, kaj stilaj eraroj tiom grandaj ke neniu Anglalingva eldonisto permesus ĝian aperon.

Ial, preskaŭ ĉiuj redaktoroj—ĉu de periodaĵoj ĉu de libroj—en Esperanto tre malinklinas eĉ elemente korekti aŭ ŝanĝi la enhavon de la artikoloj kaj libroj. Mi povas nomi nur du aŭ tri redaktorojn Esperantajn kiuj plenumas tiun sian plej gravan taskon.

(2) Neniu granda komunumo de parolantoj/verkantoj Esperantaj ekzistas; sed la Esperantistoj loĝas tre dise, kaj tre maldense, tra la mondo. Tial la tendenco al malunueco en la lingvuzado Esperanta estas tre forta. La sistemo de oficialigo de vortoj en Esperanto establiĝis specife por krei kaj konservi unuecon de la lingvo kaj malebliĝi dialektiĝon. Niaj leksikon-

¹ Piednoto: garaĝo oficialiĝis per la Oka Oficiala Aldono, 1974, kun la difino “Konstruaĵo, kie oni tenas, prizorgas aŭ riparas aŭtojn”.-d[un]

istoj plejparte *ne* atentis la enhavon de aliaj Esperantaj leksikonoj antaŭ ol eldoni la proprajn—tial la instigo al dialektiĝo vere ekzistas. Ekzemple, oni rimarkigis al mi ke multaj tre bonaj kontribuoj de Wells, Fulcher kaj Long, kaj eĉ fruaj leksikonistoj Anglalingvaj, mankas en la nova Benson-*CEED*.

(3) Miaopinie kaj Marcel, kaj Ron, kaj Alan (Towsey) multe tro emfazas logikecon. Logiko estas filozofia koncepto kiu estas tre subjektiva kaj tre malfacile aplikiĝas al lingvouzo. Mi ankoraŭ ne sukcesis kompreni la argumentojn kontraŭ “fare de” kaj “far”—la “logiko” al kiu oni apelacias tiurilate laŭ mia opinio estas efektive nur daŭrigo de Latin- kaj Helen-devenaj lingvaj kutimoj, kaj ja tio kion oni opinias “logiko” en nia aktuala kulturo estis nur inventaĵo de Aristotelo.

Multe pli grave estas ke la parolanto kaj aŭskultanto, la verkanto kaj leganto, komprenu unu la alian. Se ni ĉiuj komprenas kion celas esprimi iu persono per la vortaĵo “far” aŭ “fare de”, ne gravas ĉu laŭteorie ĝi kongruas kun ies subjektiva koncepto pri logiko. Ĉu *en la praktiko* tiuj

aŭ aliaj pridisputataj esprimoj estas miskomprenataj? Mi kredas ke ĉi tiuj kaj multaj aliaj ne.

(4) Gravas ne ke Esperanto estu simpla por ke komencantoj lernu ĝin, sed ke ĝi plenumu la taskojn por kiuj oni uzas ĝin. Se termino aŭ esprimo helpas pli klare kaj pli trafte sin esprimi, do ĝi estas uzinda—ankaŭ literaturaj valoroj grave rolas. Laŭ mia propra sperto, ofte kombinaĵo estas pli malfacile komprenata ol tute nova termino. El ĉiuj lingvoj kiujn mi studis, la Germana estas la plej amargusta kaj plej malfacila por mi, precize pro siaj nekredeblaj kombinaĵoj.

Aliflanke, vortkombinaĵoj estas tre genia parto de Esperanto kaj plifleksebligas ĝian esprimkapablon kiam ili estas klaraj kaj trafaj. Tial mi pledas ke kiu preferas uzi efektive klaran vortkombinaĵon por sin esprimi por iu celo, tiu faru tion; kaj kiu preferas apartan terminon *klare* kompreneblan, tiu uzu ĝin. Kaj ĉiu evitu esprimojn malklarajn kaj malfacile kompreneblajn, negrave ĉu vortkombinaĵajn ĉu apartaterminajn. □

S Deziras Korespondi



Adreso de la Korespondservo de AEA:

Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428

Se vi deziras korespondi kun persono en la TMisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

Guy ROBERT, Tiurunimeatie u^o-250, 55330 Tiurunienii, Finlando. 29-jaraĝa; deziras junan korespondantinton. Ampomah Batu FREMPONG, P.O. Box 46, Akim-Achiase E/R. Ganau. 21-jaraĝa; deziras korespondi kun fraŭlino, pri ĉia temo; instruas ĉe kolegio Moacir Paula AVELAR, Av. Tocantins - 1345 - Centro Anicuns GO, Cep. 76, 170000, Brazilo. Ŝatas literaturon. Sendis foton de la urbo kaj de li mem.

A. NEUSSNER, D 37248 Waldkappel, Germanio. Deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn, donas poŝtmarkojn de la tuta mondo laŭ katalogvaloro.

PRI PUBLIKA PAROLADO

De Bill kaj Betty Aulsebrook

Winston Churchill, kiu estis ankaŭ fama Brita oratoro, iam avertis spertan paroliston atenti la riskon fariĝi memkontenta kaj tro fluparola, ĉar maltrankvilo estas necesa parto de bona publika parolado.

La plej multaj aŭskultantaroj akceptas mezgradan paroliston kiu ne kapablas produkti altnivelan paroladon, kondiĉe ke li donas sin al siaj aŭskultantoj anstataŭ supozi ke la aŭskultantaro ĉeestas por liaj propraj celoj.

Mi deziras klarigi ke mi komprenas ke mi nunmomente parolas malbone Esperanton. Ankaŭ ke mi komprenas plene ke paroli Esperanton fariĝas pli kaj pli malfacile. Sed, mi estas kapabla parolisto en la Angla lingvo.

Kiam mi estis junulo, mia memkonscio ne permesis al mi paroladi eĉ Angle antaŭ grupo. Mi paralizigis jam per penso pri tia ago. Sed ĉio ŝanĝigis kiam mi aliĝis al la Sydney Rostrum Speakers Club.

Unue, mi difinu kion signifas publika parolado. Ĝi estas maniero esprimi pensojn kaj sentojn por lasi la personecon aperi. Necesas lerteco, kiel ankaŭ sento de bezono esprimi vidpunkton, por komuniki klare kaj konvinke al la aŭskultantoj.

Tre antikva klasifiko de celoj de parolado estas:

1. informi
2. persvadi aŭ konvinki
3. distri

Interrilato kun la aŭskultantaro estas gravega. Necesas ĉiuj teknikoj haveblaj de la parolanto, sed neniu

estas pli grava ol vidkontakto kun la aŭskultantoj. La parolisto devas esti fizike kiel eble plej proksima al la aŭdantaro. Li spiru profunde antaŭ ol paroli. Li ne rapidu. Li rigardu la aŭskultantojn rekte en la okulojn kaj ridetu. Nun ĉiuj atentus lin. Lumo brilas en ĉiu okulo. Li estas akceptata. Lia deziro estas levi la diskuton super la ordinaran nivelon. Se la lumo restas en iliaj okuloj, se li ankoraŭ ricevas atenton, ĉio estas bona. Sed se la brilo malaperas aŭ estingiĝas, la aŭskultantaro estas perdita. Sen sperto kaj tekniko, estas plej bone tiuokaze fermi la paroladon.

Preparo de parolado

Oni diras ke parolado konsistas el tri partoj:

1. enkonduko
2. korpo de la parolado
3. fino

Diversaj parolistoj havas diversajn metodojn. Estas grave, tamen, meti la materialon sub rubrikojn. Kelkfoje estas plej bone decidi pri la fino antaŭ ol verki la korpon kaj la enkondukon de la parolado. Ofte ekzistas forta impulso uzi tro da materialo. La paroladlongeco estas arbitra sed estas grave taksi la aŭskultokapablon de la plimulto de la aŭdantaro. Tio estas nepraĵo.

Produktado de la voĉo

Ne estas anticipite ke ordinara parolisto eldiros siajn vortojn per bonega voĉproduktado.

Nia parolisto, unue, devas konscii pri la valoro de "bona Esperanto".

Permesu al mi mencii kelkajn pli-

ajn faktorojn. Se la aŭdebleco estas malforta, la kaŭzo de la problemo povas esti simpla malforteco de la voĉo. Tio estas facile korektebla. Oni nur bezonas paroli pli laŭte!

Aliflanke, malaŭdebleco povas esti kaŭzata de timo aŭ de nebona paroltekniko. Estas pli malfacile solvi tiun problemon. Unue, necesas atenti la spiradon por ke la parolisto ne trovu sin sen sufiĉa spiro. Malfermu la buŝon, kaj, uzante la lipojn kaj langon, klopodu ĵeti la voĉon al la antaŭo de la buŝo kaj tra la malfermitan buŝon al la malantaŭa parto de la ĉambro aŭ halo.

Klara elparolado kaj dispartigado

Necesas zorgema studado kaj praktikado por doni sufiĉan emfazon al konsonantoj, vokaloj, kaj diftongoj.

Elparolado signifas la manieron per kiu vorto estas prononcata (akcentado, emfazado).

Dispartigado signifas la manieron per kiu oni diras (klareco, sen fuŝproncoj).

Estas profitige kaj utile por ĉiu kiu volas plibonigi ĉi tiujn punktojn, laŭtlege ĉiutage sur sonbendon, kaj aŭskulti la registraĵon, por memkritiko.

Tono

Multaj parolantoj troaltetonigas aŭ tromalaltetonigas la voĉon. Firma decido batali kontraŭ memkonscion riparas ĉi tiun difekton.

Unutoneco

Verŝajne tion kaŭzas manko de ĝusta uzado de paŭzoj, tono kaj voĉforteco.

Rapideco de la paolo

Oni diras ke rapidparolanto mal-

grandigas la impreson, sed tio estas arbitra. Kutime rapidparolantoj konsilas malrapidiĝi. Aliflanke, multaj mondkonataj, sukcesaj demagogoj kiuj regas emociplenajn homgrupegojn parolas rapide, almenaŭ dum parto de la parolado. Tamen, oni ne konsideru rapidecon solan, sed nur rilate al aliaj faktoroj. Ekzemple:

1. Se la parolado ŝajnas tro rapida, ĉu estas pro malsufiĉaj paŭzoj

2. Ĉu la ŝajna rapideco de eldirado estas kaŭzata de mallongeco de individuaj vortoj, tiel ke stakata efeto rezultas

3. Ĉu la eldirado estas tiom rapida ke la aŭskultantaro ne povas kompreni kion oni diras

4. Ĉu la rapideco de la eldirado obskurigas la dispartigon de la vortoj

5. Ĉu la parolanto pensas klare kaj logike?

Pozicio, gestoj, afektaĵoj

Kredeble pri ĉi tiu fazo de parolado ekzistas la plej granda diverseco de opinioj. Sed se la mesaĝo estas prava kaj la intenco sincera, parolanto estas akceptata de la plej multaj aŭskultantaroj.

Kutime staranto estas preferata ol sidanto.

Gestoj estas necesaj, sed tro da gestoj kondukas la atenton for de la temo de la parolado.

Juĝi la longecon de parolado

Iam lertega parolanto konfidence diris al mi la sekreton de sia sukceso. Estis:

1. stariĝi

2. laŭte paroli

3. fermi la buŝon! Æ

Nur tro ofte parolanto estas unue akceptata de la aŭskultantaro. Li tamen pluparolas preter la interes-

ESPERANTO IN W.A. SCHOOLS 1996

Persistence brings success

After a long period of lobbying, principally by Idyss Einihovivi, who initiated a fund for encouraging the introduction of Esperanto into Australian primary schools, it is possible to report on our first successes in W.A.

The Riverlands School in Middle Swan, a Montessori School, has established an Esperanto program for 1996.

Age:	2-6	6-9	9-12	Total
Number of children	30	40	30	100
Hours per week	1	2	2	5

School Principal Liz Marcus. The teacher is Trevor Steele, a qualified and highly experienced teacher and noted literary artist, author of the novels *Sed Nur Fragmento*, *Apena^a Papilioj en Bergen-Belsen*, the short story collection *Forgesi kaj Memori*, and other works.

The Montessori Children's Centre in Burswood, Acting Principal Marilyn Southern, has confirmed an interest in having Esperanto taught one day a week to approximately 120 students; and the Beehive Montessori School, Leslie Payne, Principal, is interested in having Esperanto taught one day a week to approximately 160 students. Two other schools, the Moeralina School in Mt Claremont and the Chrysalis Montessori School in Glendalough have also expressed interest, though no arrangements had yet been made at the time of compiling this article (Nov. 28-Dec. 18, 1995).

Mr Steele's salary is being paid by the fund mentioned above, for a one year trial period.

REPORT ON ESPERANTO AS A COMPULSORY LANGUAGE COURSE IN A PRIMARY SCHOOL

A report on the introduction of Esperanto into the curriculum of the Ipswich, Qld,
Seventh Day Adventist primary school

By Karakán Kochárdy

I had discussions with the headmaster of the Ipswich school about initiating an Esperanto language program at the school. The school, which has about 70 pupils, accepted the proposal. The headmaster asked if he could join the class and learn the language.

One lesson was held just before the school holidays. A composite class of grades 5, 6, and 7 took part. It was totally absorbed with the lesson and participated enthusiastically. The headmaster was extremely impressed and said that he had

never seen anything like it. He could not believe what he had experienced, that I could hold the attention of the whole class with Esperanto for such a long time.

After the holidays Mr Hunter asked if I would teach all the students in the school including the lower grades. Consequently I conducted the first lesson this term on the 4th of October 1995. All the students participated keenly in the lesson, and I left the classroom to shouts of “Bis revido”! It seemed like a very short 40 minute lesson.

The lower grades 1-4 were next to have their turn, grouped into one Esperanto class. The teachers from both classes seemed visibly apprehensive and uncertain about this whole arrangement, especially about integrating the class groups. Towards the beginning of the session they also voiced their concern that the children did not understand the lesson because it was all in Esperanto. I made gestures to them not to be concerned... that it would be all right. I started to ask a lot of questions which soon elicited English answers to questions in Esperanto from a few of the brighter students. I praised them immediately and interpreted their English answers into Esperanto and with clear gestures invited them to repeat their answers in Esperanto. They did. From then on that became the rule.

After the first twenty minutes the teachers also relaxed a little and started taking notes about the lesson and copying down the words and phrases that had been written on the blackboard.

The lower grades were a much rowdier group, but I overcame this problem by encouraging vocal participation as long as the attempts were made in Esperanto.

Two days after giving the last lesson, I visited the teachers of the lower grade students and asked them what they thought of the first lesson—their honest opinion! I invited criticism and comments. They admitted that they were at first concerned about the children being taught only in Esperanto, but they changed their minds and in hindsight they now see the benefits of this technique.

The headmaster said that he cannot understand why Esperanto is not a compulsory subject in all schools and is not even actively promoted by the government through the education system. Most teachers don't speak it. Some have never even heard of it.

I said that it is indeed regrettable that governments do not support the teaching of Esperanto actively, because even from an academic achievement point of view, primary school students could easily learn Esperanto without putting pressure on their present workload. Esperanto would give them an easy and enjoyable introduction to foreign languages. It would give them greater confidence to pursue foreign languages in their high school years. By then they would be absolutely fluent and proficient in the International Language.

Mr Hunter pointed out that the benefits from Esperanto are already apparent after

only two lessons in the higher grades that he teaches. The students show greater interest in the English subjects in particular, and in their school work generally.

Other languages provide a much more narrow focus than Esperanto, because they shepherd attention into one country, one culture, and at this level the children cannot really master the language to any degree of competency. Esperanto focuses on the world as a whole, and thus is the ideal language to teach in primary school.

I said that what is needed is a working model, a school where all the children were fluent in Esperanto, could converse amongst themselves and write to pen pals around the world. Primary students' study of Esperanto would open windows onto the international community for them as a matter of course. They would get a new perspective on the world and in a very practical sense gain a fresh experience in all their social study lessons. Being fluent in Esperanto at such a young age would expand their horizons.

Esperanto could also be seen as a unifying agent in our multilingual multicultural environment.

UNITED NATIONS JUBILEE

Bahá'í International Community and International Language

By Ralph Harry

On October 22, 1995, the Bahá'í Community of Sydney held a service in their House of Worship at Mona Vale, to celebrate the fiftieth anniversary of the establishment of the United Nations.

Dr Keith Suter, president of the Centre for Peace and Conflict Studies at the University of Sydney, and president of the United Nations Association of Australia, reviewed the record of the UN. He stressed that it had coordinated the decolonization revolution so that we now have, as a percentage of world population, the smallest number of people living in a colonial situation in history.

Other guests included Stella Cornelius, Director of the Conflict Resolution network, and Dr Ralph Harry, former Australian Ambassador to the United Nations in New York and a member of the Patrons Committee of the *Universala Esperanto-Asocio*.

Copies were distributed of the document "Turning point for all nations" submitted by the Bahá'í International Community to the United Nations in New York. It included the following:

4. MAKING A COMMITMENT TO A UNIVERSAL AUXILIARY LANGUAGE AND A COMMON SCRIPT

The United Nations, which currently uses six official languages, would derive substantial benefits from either choosing a single existing language or creating a new one to be used as an auxiliary language in all its forums. Such a step has long been advocated by many groups, from the Esperantists to the Bahá'í International Community itself. In addition to saving money and simplifying bureaucratic procedures, such a move would go far toward promoting a spirit of unity.

We propose the appointment of a high-level Commission, with members from various regions and drawn from relevant fields, including linguistics, economics, the social sciences, education and the media, to begin careful study on the matter of an international auxiliary language and the adoption of a common script.

We foresee that eventually, the world cannot but adopt a single, universally agreed-upon auxiliary language and script to be taught in schools world-wide, as a supplement to the language or languages of each country. The objective would be to facilitate the transition to a global society through better communication among nations, reduction or administrative costs for businesses, governments and other involved in global enterprise, and a general fostering of more cordial relations between all members of the human family.

This proposal should be read narrowly. it does not in any way envision the decline of any living language or culture.

IF YOU WOULD LIKE TO KNOW MORE ABOUT ESPERANTO

or to enrol for correspondence courses in Esperanto, we suggest you contact:

John Moore
Esperanto Correspondence Courses
7 Pelican St
Emu Park Qld 4702
Australia

iĝkapablon de la aŭskultantoj, kiuj iĝas tre lacaj, ĉesas aŭskulti kaj deziras nur la finon de la parolado. Pro ĝentileco la aŭskultantoj ne eliras, sed ili tediĝas. Kelkfoje la parolinto ne komprenas kial oni ne entuziasme reinvitas lin paroladi aŭ kial la nombro da ĉeestantoj malgrandiĝas.

Resumo

1. Sufiĉa atento al preparo de paroladoj
2. Sindono al la aŭskultantaro
3. Interrilato kun la aŭskultantaro
4. Valoro de bona Esperanto
5. Atento al voĉproduktado, aŭd-

- ebleco, elparolo kaj dispartigado
6. Paŭzoj, tono, rapideco, pozicio, gestoj
 7. Kvalito kaj kvanto da materialo
 8. Kapablo kompreni, de la aŭskultantaro
 9. Frapa enkonduko
 10. Logiko de la parolado
 11. Ĝustatempa frapanta finaĵo

Preparo por 1997

Mi proponas ke ni ĉiuj, junaj kaj maljunaj, spertaj kaj malspertaj, levu nian nunan nivelon de parolado, por prepari nin por la Universala Kongreso en Adelajdo en 1997. □

;

LINGVA ANGULO

De Alan Towsey



De nia redaktoro venis letereto kun humuro el *Eventoj* (2/junio 1995):

Oni prefere lernu naĝi... Iu homo, dronante en rivero, krias en diversaj lingvoj: Helpu min! Pomogitje! Segítség! ktp. Iu el la rigardantoj de la ponto rimarkas:

“Jen strangulo! Anstataŭ ol lerni tiom da lingvoj, li prefere lernus naĝi...”

Nu, la afero estas efektive simpla. Ni komencu nian diskuton per **antaŭ**.

Nia redaktoro daŭrigas: “Ĉar mi ofte trovas konfuzon inter komencantoj kaj novaj Esperantistoj (evidente, ankaŭ malnovaj Esperantistoj) pri **ol** kun **anstataŭ**, mi proponas ke vi pri-traktu ĝin en via Lingva Angulo...”

Antaŭ

Tiu ĉi estas prepozicio (= before

[time and place]; in front of; above [in rank]), uzata ĉiam kun substantivo, pronomo aŭ adverbo:

Antaŭ la domo staris arbo

Ni alvenos antaŭ la sesa/antaŭ (ol) vi. (*Vidu malsupre.*)

Oni metis antaŭ mi glason.^z

sin ĵeti antaŭ ies piedojn.^z

Li mortis antaŭ tri jaroj (= three years ago.)

La pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük estas ekster dubo.^z

rangigi la ekonomikon antaŭ la politiko.^{PIV} (put economics above politics)

Kun subpropozicio (dependent clause) aŭ infinitivo oni devas aldoni **ol**—ĝi tiam estas kunmetita subjunkcio (compound subordinating conjunction):

Antaŭ ol mi povis paroli, li

foriris.

Li frapfaligos vin (will knock you down) antaŭ ol vi povos defendi vin. (Notu la verbotempon!)

Ne interrompu min antaŭ ol mi finos paroli! (Don't interrupt me before I've finished speaking!) Denove, notu la verbotempon!

Oni povas uzi la infinitivon se la subjekto de ambaŭ partoj de la frazo estas la sama:

Mi ĉiam trinkas glason da lakto antaŭ ol enlitiĝi ĉiuvespere.

Por eviti eventualan konfuzon inter la loka kaj tempa sencoj de la vorto, oni povas enmeti klarigan vorton:

Ni aperos ie antaŭ vi (= in front of you).

Ni aperos pli frue (aŭ antaŭ) ol vi (aperos) (= before you [do]).

Anstataŭ

Anstataŭ estas nur prepozicio, kaj estas unu el la solaj kvin prepozicioj kiujn oni povas uzi kun infinitivo (**antaŭ ol**, **anstataŭ**, **por**, **krom**, **sen**):

Uzu globskribilon anstataŭ kraĵono.

N.B.: Petro batis Paŭlon anstataŭ (bati) Vilhelmon.²

Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmo (Ne Vilhelmo, sed Petro, batis Paŭlon).

Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon.² (Instead of everyone learning...)

sed:

Anstataŭ plori, ŝi ekridis.) Instead of weeping,...).

(Kiel kun **antaŭ ol**, oni povas uzi la infinitivon kiam la subjekto de

ambaŭ partoj de la frazo estas la sama.)

Oni uzas la indikativon post **anstataŭ ke** kiam la prepozicio esprimas fakton, sed oni uzas la kondicionalon kiam ĝi esprimas ne-realaĵon. Zorge komparu la jenajn ekzemplojn kaj pripensu la diferenc-on:

Anstataŭ ke vi babilas senĉese, ni studu kune. (Instead of you chattering all the time, let's study together.)

Li babilis senĉese, anstataŭ ke ni studus kune. (He chattered all the time instead of us studying together.)

La uzo de **ol** post **anstataŭ** estas do eraro, pro konfuzo kun **antaŭ ol**.

N.B.: Neniam uzu **post** kun infinitivo! Oni uzas la preteritan particon:

Ŝlosinte la pordon, li eliris. (After locking the door, he went out.)

Kelkaj aŭtoroj eksperimentis kun **post ol** por enkonduki subpropozicion, sed la ĝenerala uzado estas **post kiam**:

Post kiam li finis paroli, mi direktis demandon al li.

Krom

Krom havas du signifojn: angle "but" (= except) kaj "besides", kaj povas esti uzata ankaŭ kun infinitivo.

Ĝi signifas "but/except" post negativo aŭ post vortoj esprimantaj (aŭ subkomprenantaj) tutecon: (**ĉiu**, **ĉio**, **tuta**, ktp.):

Ne estas Dio krom Mi. (There is no God but Me).

Ĉie estis nenio krom akvo. (...nothing but water).

Ni povas fari nenion krom atendi. (We can do nothing but wait.)

Neniu alia vorto krom tiu konvenos. (No other word but that one will do.)

Mi diras al vi nenion alian krom plej pura vero.^z (= nothing else but...)

Sed laŭ PAG, "Post **neniu (nenio) alia** oni uzas **ol**:"

Mi diras al vi nenion alian ol la plej puran veron." (Notu la kazon post **ol** ĉi tie!)

Via (tuta) teksto estas senerara krom unu frazo.^{PAG} (...but for one sentence)

Mi perdis (ĉiujn) liajn leterojn krom unu^{PAG} (...[all] his letters but one.)

En pozitivaj frazoj ĝi ĝenerale signifas "besides". Notu ke, por eviti ĉian dubon pri la senco, oni povas enmeti **ankaŭ**, aŭ uzi **escepte de**:

Per pruntedono ofte oni perdas, krom sia havo, ankaŭ la amikon.^z (...besides one's property...)

Vi povus perdi vian vivon krom via mono. (You could lose your life as well as your money.)

Oni povas uzi ankaŭ krajonon krom globskribilo. (You can use a pencil as well as a biro.)

Krom tio ke ŝi insultis min/
Krom insulti min, ŝi (ankaŭ)

donis al mi vangofrapon. (Besides insulting me, she slapped my face as well.)

Krom Petro, tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj fratoj.^z (Besides Peter, all my other brothers were there.)

Mi uzos ankaŭ aliajn rimedojn krom tiu.^{PAG} (I'll use other means besides that.)

Mi iros al la urbo morgaŭ, krom se (= se ne) pluvos. (I'll go to town tomorrow unless it rains/if it doesn't rain.)

Komparu:

Krom Maria, ankaŭ la aliaj ridis. (Besides Mary, the others laughed too.)

Escepte de Maria, ankaŭ la aliaj ridis. (Except for Mary, the others laughed too.)

krome (adverbo) = besides, in addition, furthermore, as well, moreover, what's more (= krom tio, aldone al tio):

Ŝi estas bela, kaj krome riĉa. (...and rich as well.)

Vi ne povas eliri—vi ne havas monon, kaj krome, vi estas malsana. (...and besides/not only that, you're sick.)

kroma (adjektivo) = other (in addition):

Naŭ kromaj personoj vidis la akcidenton. (Nine other people saw the accident as well.) □

Via redaktoro
ferias



Ĝis la 23a de
januaro kaj ne
estos atingebla
anta^a tiam.

PARTICIPADO

De Marcel Leereveld

La kombino de esti kun particip-sufiksa adjektivo devetas ne esti problemo en Esperanto, kvankam la senordeco de la participoj en etnaj lingvoj eŭropaj emas konfuzi la lernanton de fremda lingvo.

Necesas klare konscii pri la signifoj de esti kaj de la participaj adjektivoj, kaj speciale ke dum en etnaj lingvoj la kombinaĵoj havas ĝenerale po unu signifon, en Esperanto la signifo de esti restas ekzakte la sama en ĉiuj tiaj kombinaĵoj, kaj ne estas tute kunfandita kun la signifo de la participo, kiu komplete tenadas sian adjektivan signifon. Do uzante ekz. *La kuko estas manĝita* ni devas analize signifigi kaj *estas* kaj *manĝita*, kion oni ofte ne faras en etnaj lingvoj. Cetere en Esperanto oni ĉiam devas konscii pri la signifo de la uzataj vortoj, por ke ĝi ne degeneru.

Konsciante pri la signifoj de la apartaj vortoj en la Esperanta kombinaĵo, oni ne povas ne kompreni la signifaron de la tuta frazo. Necesas ne malatenti la sekvantajn regulojn aplikendajn al participaj kombinaĵoj:

1) a) Manĝanta infano estas infano kiu komencis manĝi kaj nun daŭrigas la manĝadon, kiu tamen ankoraŭ ne finiĝis.

(b) Manĝata pomo estas pomo kiun iu komencis manĝi kaj nun daŭrigas manĝi, sed kiun pomon tiu ankoraŭ ne finis manĝi.

c) Manĝinta infano estas infano kiu ĵus finis manĝi, kompletigante la manĝadon.

ĉ) Manĝita pomo estas pomo

kiun iu ĵus finis manĝi, kompletigante la manĝadon.

d) Manĝonta infano estas infano kiu tuj aŭ baldaŭ komencos manĝi kaj daŭrigi la manĝadon (kaj fini ĝin).

e) Manĝota pomo estas pomo kiun iu tuj aŭ baldaŭ komencos kaj finos manĝi.

2) La tempo de la verbo *estas, estis, estos* (kaj *esti, estu* kaj *estus*) estas ligita aŭ al la tempo de la diro aŭ al la tempo de alia ago, kiel ekz. en *Oni telefonis, kiam mi estis manĝanta*.

3) Jam laŭ Zamenhof, la sufikso at povas indiki aŭ 1) estantecon kaj pasivecon kune, aŭ 2) nur la pasivecon ĝeneralan. Ĉar en la dua kazo temas pri nur verba funkcio, estas logike uzi *at* en tiu nur pasiva senco (por kiu mankas speciala indikilo en Esperanto) nur verbe, do en la formo de *ati* (ne *iti* nek *oti*, kiuj havas la du signifojn kune). Sekve estas (kaj devas esti) diferenco inter *la pordo estas fermata* = en la procedo (aspekto!) esti pasive fermata, komenciĝinte kaj nefiniĝinte, kaj *la pordo fermatas* = oni fermas la pordon = kompletigas la tutan agon.

4) Se la tuta ago ne povas okazi en la nuno, oni uzu -anta (= pli ofte ol en eŭropaj lingvoj!): *Mi nun estas skribanta leteron*, escepte kiam temas pri ĝeneraleco: *Mi ĉiam manĝas frukton ĉe la fino*.

5) Pro ĝusta decido de la Aka-

demio, la sufiksoj *int*, *it*, *ont* kaj *ot* ne plu indikas aspektojn, sed nur specialan temprilaton. Alivorte: *mi estas (is, os) ferminta* = mi fermis la pordon en la proksima pasinteco, kaj *la pordo estas (is, os) fermota* = la pordo fermatos en la proksima estonteco. Unu el la kialoj estas, ke “aspekto” ne indiku en Esperanto komenciĝon aŭ finiĝon de ago, pro nebezono de tiaj aspektoj, sed indiku nur komenciĝintan daŭran nefiniĝintan agon, kies esprimiloj estas nur *anta* kaj *ata* (pasinta kaj estonta aspektoj de daŭreco logike ne eblas, nur estanta daŭro en la pasinteco kaj en la estonteco: estis fermanta, estos fermata, kaj en la nuno).

6) *-as*, *-is*, *-os*, *-atas*, *-atis*, *-atos* = tempo (kaj aktiveco aŭ pasiveco) en kiu la tuta ago okazas.

-anta kaj *-ata* = aspekto = ago vidata en la nefiniĝinta daŭro de ĝia okazo.

-inta kaj *-ita* = ago ĵus finiĝinta rilate al iu alia (pasinta, nuna aŭ venonta momento).

-onta kaj *-ota* = ago tuj aŭ baldaŭ okazonta rilate al iu alia (pasinta, nuna aŭ venonta) momento.

7) Ĉar aspekto indikas nur la daŭrecon de ago, bezoniĝas specialaj indikiloj por la komenciĝo de ago kaj por la finiĝo de ago. Por la komenciĝo Zamenhof kreis la prefikson *ek* (ekfermi, ekfermati); por la finiĝo mankas speciala indikilo; do ni bezonas krei tion, ekz. *fin-* (finfermi, finfermati), *malek* (malekfermi, malekfermati), aŭ, plej logike, *fini* (mi fermfinis la pordon = mi finis fermi la pordon kaj *la pordo fermfinatis* = la pordo finis fermati).

8) A) Indikiĝas nur la tempo de la kompletiginta ago kaj ĝia aktiveco/pasiveco:

Akt.: Mi fermas la pordon

Pas.: La pordo fermatas

Akt.: Mi fermis la pordon

Pas.: La pordo fermatis

Akt.: Mi fermos la pordon

Pas.: La pordo fermatos

B) Indikiĝas aspekto de daŭro de la ago, kaj ĝia nefiniĝo kaj tempo (per *esti*):

Akt.: Mi estas fermanta la pordon = nun.

Pas.: La pordo estas fermata = nun.

Akt.: Mi estis fermanta la pordon = iam en la pasinteco

Pas.: La pordo estis fermata = iam en la pasinteco.

Akt.: Mi estos fermanta la pordon = iam en la venonteco.

Pas.: La pordo estos fermata = iam en la venonteco.

C) Indikiĝas du tempoj kaj aktiveco/pasiveco:

Akt.: Mi estas ferminta la pordon

Pas.: La pordo estas fermita

Ago okazinta en ĵusa pasinteco rilate al nun.

Akt.: Mi estas fermonta

Pas.: La pordo estas fermota

Ago okazonta en tuja estonteco rilate al la estanteco.

Akt.: Mi estis ferminta

Pas.: La pordo estis fermita

Ago okazinta en ĵusa pasinteco rilate al iu momento en la pasinteco.

Akt.: Mi estis fermonta

Pas.: La pordo estis fermota
Ago okazonta en tuja estonteco
rilate al iu momento en la pasinteco.

Akt.: Mi estos ferminta

Pas.: La pordo estos fermita
Ago okazinta en ĵusa pasinteco
rilate al iu alia momento en la estonteco.

Akt.: Mi estos fermonta

Pas.: La pordo estos fermota
Ago okazonta en tuja estonteco
rilate al iu alia momento en la estonteco.

9) Jen kelkaj anglaj rilatantaj esprimoj:

I close the door — Mi fermas la pordon.

I am closing the door — Mi estas fermanta.

I shall close the door — Mi fermos.

I shall be closing the door — Mi estos fermanta.

I am going to close the door — Mi estas fermonta.

I closed the door — Mi fermis.

I have closed the door — Mi estas ferminta.

I was closing the door — Mi estis fermanta.

I had closed the door — Mi estis

ferminta.

I shall have closed the door — Mi estos ferminta.

I was going to close the door — Mi estis fermonta.

I have been closing the door — Mi estas fermadinta la pordon.

The door gets closed — La pordo fermatas.

The door is being closed — La pordo estas fermata.

The door will be (get) closed — La pordo fermatos.

The door will be being closed — La pordo estos fermata.

The door was closed — La pordo fermatis.

The door has been closed — La pordo estas fermita.

The door was being closed — La pordo estis fermata.

The door had been closed — La pordo estis fermita.

The door will have been closed — La pordo estos fermita.

The door was going to be closed — La pordo estis fermota.

11) Se do en ekz. la angla la kombinaĵo enhavas la verbon *havi*, (I have seen), oni en Esperanto ĉiam *estas*, nome oni estas “having seen” = adjektivo **vidinta**. □

LA SORĈISTO DE OZ

Preparata estas malgranda, ilustrita eldono de la du klasikaj porinfanaj romanoj *La Sorĉisto de Oz* kaj *La Lando Oz* de L. Frank Baum. Tradukis Donald Broadribb. La du volumoj havos grandajn literojn, por facila legado. La prezo estos ĉirkaŭ \$25–\$30 por ĉiu volumo, inkl. sendkostojn. Se vi deziras antaŭmendi ekzemplero(j)n, skribu al Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Pago estos necesa nur post via ricevo de la mendita(j) libro(j). La libroj estas nur private mendeblaj; ili ne estos vendataj de libroservoj nek de UEA, kaj estos riceveblaj nur dum nelonga periodo.

RIKOLTO DE STRANGAJ VORTOJ

De Donald Broadribb

“Per laboro interesa kaj amuza...ni *obtenis* manĝaĵon kaj loĝaĵon” (*akiris*).—*Eventoj* 1/oktobro 1995. (Verkis Italo.)

“Memorindas multaj spontanaj *besedoj* ĝis malfrua nokto antaŭ botelo da rusa vodko” (??)—*Boletín* de la Hispana Esperanto-Federacio, septembro—oktobro 1995. (Verkis Hispano.) — Eble hispanismo kiun la verkinto erare supozas esti tutmonde konata?¹

La gazeto *Rok-gazet'* plejparte estas bonege redaktata. Tamen en numero 7 (1995) mi rikoltis plurajn gemojn: “sintezilo de *multimedia* kreaĵo” (Angle: *multimedia*); “de melodia popmuziko ĝis punko, tra *hardkoro*.” (Angle: *hard core*); “La bando certe havos bonan *ontumon* en sia fako” (*estontecon*—ne plene pseŭdoesperanta vorto); “[la disko] havas pli *kantrian/blugrasan* koloron” (Angle: country blue grass!!!);

“Preparante tie sian revuon kaj sendante ĉion *telematike* al okcidento” (elektronike? per komputilaj diskoj? Per elektronika utiligado de telefonaj lineoj?)—*La Gazeto* 31 okt. 1995. (Verkis Italo.) Povas esti ke por la celata signifo speciala vorto estas bezonata, sed neniu klarigo eksplikas ĝin, kaj la intencata signifo tute ne estas klara. (Ŝajne “telematik-” estas formita el “tele” + “aŭtomat-” + pseŭdosufikso -ik-.)

¹ Sed Vera Payne atentigas min ke la vorto *besjeda/beseda* estas Kroata vorto kun la signifo “vorto, konversacio”, do “besedo” estas slavismo.

En multaj eldonaĵoj nuntempaj kaj de la lastaj tri-kvar jaroj mi legas pri “**videoj**”, “**video-filmoj**”, kaj “**video-klipoj**”. Tamen ili estas simplaj “vidbendoj”. Nu, en la Angla lingvo mankas simpla ekvivalento de nia Esperanta esprimo “vidbendo”, tial oni kreis la Anglan vorton “video”. Sed ĉu Esperantistoj opinias ke ĉiu Anglalingva vorto estas aŭtomate uzinda en Esperanto?

Kelkfoje, tamen, kombinaĵo farita el tradiciaj elementoj povas esti malfacile aŭ tute ne komprenebla. Ekzemple, mi legas en *Sennaciulo* Novembro 1995: “pri demandoj de *hejtajenergetika komplekso*”, kies senco estas nur nefacile divenebla. La kunteksto poste informas ke temas pri nafto kaj gaso (nafta gaso?), do verŝajne fuelo (en *PIVS*; Angle: *fuel*), bruligataj por eviti la krevon de tuboj dum vintro. *Energetiko* estas, laŭ *PIV* “scienco pri la energio”, sed la Rusa aŭtoro ŝajne donas al ĝi specialan kvankam neeksplikitan sencon. Pri la *komplekso*, mi suspektas ke temas pri *aro de fabrikoj*, do ensume io kia “heat production centres using (liĝid and natural gas) fuels”. Sed tio estas nur diveno. Ĉiuj tri ĉefpartoj de la presita esprimo estas malklar-signifaj: *hejtaj-*, *energetika*, kaj *komplekso*. Ĉu iu povas pliklarigi la aferon?

Laste, en kutime tre kompetente redaktata gazeto *Esperantolehti* aperas tre stranga vorto, kiu ŝajne ne estas preseraro: “Ili kun naŭza fiera mieno *pasumaĝis* en la seĝoj celitaj

al hotelgastoj”. Ĉu Finna ekvivalento de la Hispana deziro paroli pri siaj misteraj “besedoj” komprenata nur

de la verkinto? Disdialektiĝo de Esperanto ankoraŭ estas danĝera ebleco. □

MI FIERE FUĜIS

De Odlo Bokserp

Atentaj legantoj sendube rimarkis ke en nia lasta Numero de *ESK* plurfoje la litero β aperis kie tradiciuloj anticipus trovi la literon Ĝ. Mi multe pardonpetas pro tiu tajperaro, kaj petas ĉiujn korekti al β .

Sur p. 10 estas dirite ke informo pri Ŝejko Al Aba Ko aperas sur p. 12. Kelkaj legantoj eble supozas ke la ĝusta paĝnumero estas 13. Sed komprenoble la numero devas esti 212.

Mi ankoraŭ sukcesis bele misliterumi la nomon de la Ŝejko.

Sur p.14 mankas citosigno en la komenco de la tria linio. Bonvolu legi *fiŝoriĉa*”.

Sur p.26 mi ellasis alineon, pretekstante al la redaktoro ke jam tro da spaco okupas lia artikolaĉo. Domaĝe, ankoraŭ eblas kompreni la tekston eĉ sen tiu alineo. □

ŜANĜO DE EKSPEDANTO

Esperanto sub la Suda Kruco ekde ĉi tiu numero estas enpoŝtigata en Sidnejo. Se vi volas korekti vian adreson aŭ literumon de via nomo, informi pri neveninta ekzemplero aŭ aliaj ekspederaroj, bonvolu kontakti

Tom Elliott ĉe la adreso de la libro-servo de AEA.

Esperanto sub la Suda Kruco ankoraŭ estas, ekde ĉi tiu numero, presata de nova presisto. La kompostadon plu faras la redaktoro. □

MARCEL LEEREVELD

informas aĉetintojn de la libro *Por Ĝuste Uzi Esperanton*, ke ili povas akiri de li senpage po ekzempleron de diversaj ekstraj artikoloj nun aldon-

ataj al la libro de li. (Ĉi tiuj artikoloj aperos en estontaj eldonoj de la libro.) Lia adreso: 12 Heather Grove, Belgrave South Vic 3160, Aŭstralio. □

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO LEGEBLA PER LA INTERNET

Se vi uzas la Interneton, aŭ tion faras amiko via, eble vin interesos legi la tekston de *ESK* elektronike. Ĝi estas legebla ĉe la adreso

<http://www.dialix.com.au/~peterb/esk/index.htm>

DISKUTITE ĈIUJN KOREKTOJN, KAJ PETAS ĈIUN KOREKTI AL β .

Komunikas Edna Turvey

La ĉisekva elektronikpoŝta komunikado atingis vian redaktoron en novembro:

“Saluton el Sidnejo! Finfine ni progresetas al la 20-a jarcento. Kelkaj el ni volas starigi reton por korespondi pri aferoj kiaj U.K. en Ade-

lajdo ktp.”

Edna Turvey

<ednat@sydney.DIALix.oz.au>

Kiu deziras partopreni en la nova Internet-grupo, tiu bonvolu kontakti Ednan. □

INTERNET-GRUPO DE ESPERANTO- REDAKTOROJ

Frue en decembro 1995, laŭ iniciato de la gazeto *Eventoj*, neformala Internet-grupo de redaktoroj de Esperanto-gazetoj formiĝis, por interinformiĝi pri lastatempaj Esperanto-eventoj kaj tiel povi pli frue kaj pli

akurate publikigi informojn. Povas troviĝi en la Listo ankaŭ ne-redaktoroj kiuj iel pritraktas tiajn informojn, aŭ volas legi pri ili. Prizorgas la Liston la redaktoro de *ESK* ĉe la adreso don@enkidu.dialix.oz.au □

DENOVE PRI ALAN TURVEY

Aldone al nia artikolo sur p.1 de la septembra (1995) numero de *ESK*, ni legis en la Korea gazeto *La Lanterno Azia* (junio 1995, atinginta nin en la mezo de novembro!) la ĉisekvan artikolon:

“Ne maloftas internacia geedziĝo pere de Esperanto, sed en Koreo ĝi estas raraĵo. Tamen laste naskiĝis nova geedza paro, kiu pravigas la proverbon: *Amo ne konas aĝon kaj naciecon...*

“La ceremonio plenumiĝis laŭ la Korea tradicia moro en la Folkloro Vilaĝo. Estis sennube kaj varmege. Ili estis vestitaj en *hanboko* (Korea tradicia vesto). La ceremonigvidanto prezidis en la Korea. Ho Song apud-

ante la novan edzon Alan interpretis. Estis malfacile al Alan surgenue riverenci.

Multaj turistoj spektis la ceremonion. Venis dudeko da enlandaj kaj eksterlandaj Esperantistoj el Aŭstralio, Germanio, Hongkongo, Japanio, Kanado, Koreo, Nov-Zelando, Usono. Kvankam ni ne ĉiuj venis precipe por la nupto, tamen ni tuj fariĝis oknacia gratulkaravano.

Post la nupto okazis festeno. Laŭvice ni diris bondezirajn vortojn. La nova edzino parolis responde al la gratulvortoj de la ĉeestantaro: “Sen Esperanto mi ne povas renkontiĝi kun edzo.”...

Alan volis saluti al ŝia patrino en

la Korea, dirante “Bonan nokton.” Sed li ne korekte prononcis kaj lia parolo aŭdiĝis al ŝi “Bonan morton”. Aŭdinte la epizodon ni ride eksplodis, kaj la festo pli kaj pli agrablighis.

Nova naskiĝo de Esperantlingva familio. Gratulon kaj feliĉan geedzan vivon!”

[Teksto iomete korektita.]

BRIAN CURRIE

Longatempe Brian Currie ne ĝuis bonan sanon, pro sia hepao. Lastatempe li ricevis novan, kaj ni

esperas ke tio resanigos lin.

Laŭ *Teleopeo* Novembro 1995

82a UNIVERSALA KONGRESO EN ADELAJDO 1997

En la oktobra 1995 Sidneja Esperanto-Seminario—

Kep enkondukis diskuton pri la 82-a UK, kiu okazos en Adelajdo en 1997. Li informis ke kvankam la Ĉefministro Paul Keating respondis ke estas tro frue por respondi al invito fariĝi patrono, Senatano Gareth Evans indikis ke li akceptos postenon, laŭ elekto de AEA, por helpi.

Oni diskutis la neceson organizi

ĉiĉeronojn por ekskursoj. Ralph Harry proponis ke oni registru komentariojn en Esperanto por uzado en busoj. Oni povus registri en Esperanto la komentariojn pri Aŭstraliaj bestoj faritajn de aborigenaj spertuloj en la zoologiaj ĝardenoj. Ralph ankaŭ proponis ke oni organizu rondiradon en la urbo, dum kiu kongresanoj disdonu flugfoliojn pri la Kongreso kaj Esperanto. □

SEMINARIO DE LA SIDNEJA ESPERANTO-SOCIETO EN OKTOBRO 1995

Kvindek Esperantistoj, inkl. el Kanbero, Brunswick Heads, Hobart, Tahmoor, kaj Forster, partoprenis en vigla seminario en Esperanto-Domo la 14an kaj 15an de oktobro. Prezidis Terry Manley.

Oni montris vidbendon pri la 79-a Universala Kongreso en Seulo. Kep Enderby emfazis ke du trionoj de la partoprenantoj estis el Aziaj landoj.

Li ankaŭ raportis (vidu supre) pri respondoj de Paul Keating kaj Gareth Evans al propono ke ili iĝu patronoj de la estonta UK en Adelajdo.

Ralph Harry parolis pri la 80-a UK en Finnlando kaj la UK-rezolucio ke oni modernigu la Ĉarton de UN.

Alan Towsey faris interesan prelegon pri la origino de la afiksoj kaj

prepozicioj en Esperanto. Ĉar Zamenhof ne indikis el kie li prenis tiujn erojn, la lingvistoj kelkfoje ne povas certe scii la etimologion.

Terry Manley raportis pri sia vizito al Melburno. Tie li konatiĝis kun instruistoj kaj infanoj en la lernejo de Clayton North kie oni instruas Esperanton kiel parton de la projekto **Ekparoli** de Alan kaj Jenny Bishop.

Bill Aulsebrook kaj Tom Elliott montris kiel per siaj amatoraj radiostacioj ili povas paroli al Esperantistoj en aliaj landoj.

Alan Turvey, kun Mark kaj Jeff Hayward parolis pri kiel aliĝi al la Internet kaj kion oni povas trovi tie. Ralph Harry menciis ke kiam lia filo

vizitis Singapuron kelkajn tagojn post la UK, li trovis por li en la Internet raporton pri agado en Tampere kaj la tekston de la rezolucio de UK.

Distraĵoj: La grupo de Manlio rolis en simplaj folkdancoj por montri dancojn taŭgajn por kongresanoj. Ĝo, Terry, Alan kaj Edna prezentis drameton *Ŝtelita Reĝfilino*. Alan kaj Ĝo montris vidbendon pri sia belega tradicia geedziĝo en Koreo. Jeanie Kelso bele kantis kelkajn melodiojn. Poste oni tostis la paron.

(Raportis Eunice Graham, Ralph Harry, Terry Manley, Edna Turvey.)

Laŭ artikolo en *Telopee*
Decembro 1995.

AKTUALAJ INFORMOJ BEZONATAJ

La redaktoro atentigas ke dum la lastaj monatoj preskaŭ neniuj informoj pri loka agado kaj lokaj grupoj sendiĝis por apero en *ESK*. Pro tio la regula rubriko "El la regionoj" mankas. Ni urĝe petas lokajn grupojn regule kaj frue sendi siajn informojn por publikigo en *ESK*, kaj atenti ke plejofte lokaj bultenoj ne sufiĉas por ke ĝisdataj informoj estu transprenataj en nia gazeton. Ne supozu ke "iu

alia persono sendube informas la redaktoron de *ESK*". Plejofte tio ne okazas. Tial ni nur monatojn tro malfrue sciiĝis pri la geedziĝo de Alan Turvey kaj Ĝo Kjung-Mi, la transplanto de hepato por Brian Currie, la Sidneja Esperanto-Seminario, kaj diversaj aliaj temoj. Niaj legantoj en la tuta kontinento deziras akurate legi pri ĉi tiaj temoj. Bonvolu informi nin. □

PRINTEMPA KUNVENO EN MASTERTON

Raportas Marilyn Henderson

[Kiel distri partoprenantojn en kunveno? Jen tre bona ekzemplo:]

Je la 9a kaj 10a de septembro la Esperanto-Klubo de Masterton okaz-

igis semajnfinan kunvenon en la ĉambroj de la Kroketo-Klubo de Masterton ĉe la bela Parko Masterton. Ni bonvenigis vizitantojn el

Auckland, Napier, Pahiatua kaj Wellington per teo, kafo, ktp.

Fred Adams prezentis tre interesan bildenigmon: ni devis decidi kie en la mondo aŭ en Nov-Zelando estas ĉiu vidaĵo. Ĉar li montris kelkajn malnovajn fotojn el Nov-Zelando, estis ne tre facile. Post la bongusta vespera ĉefmanĝo, Fred stimulis diskuton per mallonga parolo pri televidreklamoj. “Feliĉa Duonhora” kun suko kaj vinoj, preparita de Joy Garard, fluigis ĉi tiun babiladon. Esperantaj muzikokasedoj ankaŭ malrigidigis la okazon.

Don Rogers parolis pri la disvastiĝo de la Angla lingvo en Ĉinio. Brian Fox parolis pri antaŭnelonga vizito al Samoo. Jackie Fox montris fotojn kaj parolis pri sia piedmarŝa ekskurso en la sudaj Tararuaj Montoj. Rae Grice petis kelkajn partoprenantojn paroli dum 2-4 minutoj laŭ temoj kiujn ŝi elektis. Stephanie May laŭtlegis du ĉarmajn poemojn kiujn ŝi verkis.

La Klubo de Masterton lege aktorin drameton, kaj dum la du tagoj ĉiu partoprenanto vole-nevole ankaŭ lege aktorin du- aŭ tri-rolulajn drametojn. David Ryan estris kvizon pri diversaj temoj. Eileen Olsen aŭskultigis al ni sonbendon kiun ŝia patro Arthur Wiltshire registris kiam Wilhelm Schmid rakontis “La Princino kaj la Pizo” dum Universala Kongreso. Ni ankaŭ aŭskultis sonbendon de

Monato por blinduloj. La sonbendigita recepto estis legita tro rapide por ke oni skribu la tuton; sed ni bone komprenis kiam Jack Boyd laŭtlegis dum Marilyn Henderson mimis preparadon de Oranĝaj Margrafinoj, kaj kiam Kay Dobson laŭtlegis dum Lydia Greig mimis la preparadon de omleto.

Ankaŭ ni klarigis “Kion Sinjorino Malaprop kaj Doktoro Spooner intencis diri”; por trovi unu novan vorton ni divenis du aliajn de priskriboj; skribis vortojn en spacojn por fini ĉerpajojn el *La Taglibro de Anne Frank*, kaj komparis niajn decidojn kun la traduko de G.J. Degenkamp. Grupoj skribis rakontojn por ligi donitan komencan frazon kun finfrazo. Ili ankaŭ proponis kial kvin aĵoj estis en forgesita saketo. Du personoj vice skribis unu vorton ĝis ili verkis rakonteton.

Dimanĉe, je la 3a ptm, nia parolkapablo iom hezitis, do la lasta ero antaŭ la tepaŭzo kaj adiaŭo estis “Domiling”. Kvankam ĝi estas ludo de bildvortaj domenoj por infanoj, ĝi sufiĉe streĉis nin.

Ĉiuj lace hejmoniris kun novaj eroj uzeblaj en siaj kluboj. La Mastertonanoj akordas ke la tuta afero valoris la penon.

[Foto aperis en nia antaŭa numero, Nov-Dec. 1995, p. 20.] □

PAUL DESAILLY SKRIBAS

Post multaj koincidoj kaj aventuroj mi sekure alvenis en Edirne, tra Romon kaj Sofion. La Romaj samideanoj, precipe s-ino Lipari, bonvoleme invitis min fari prelegon en resto-

racio pri miaj travivaĵoj en Pollando kaj pri la kunvivo de la Bahaa kredo kaj Esperanto.

Tiu ĉi izola kaj speciala angulo de Eŭropo estas signifoplena por mi kiel

Turkio. En apuda Gallipoli mi estis pilgrimanto ĉe la multaj atenteme konservataj monumentoj honore al ĉiuj mortintoj. Malgraŭ la vintra vetero kaj izolo pli ol 20 homoj, ĉefe Aŭstralianoj kaj Novzelandanoj, agis same. Post tri generacioj la procesio ankoraŭ daŭras—efektive nia ĉiĉerono diris ke la nombroj kreskas. Tio imponas al la Turkoj pro la manifestiĝo de respekto, tiagrade ke ili estas tre helpemaj ne nur al turistoj sed al pilgrimantoj. Ĉe Anzac House, hotelo apud la batalejoj kie estas dungita Aŭstralia personaro, mi renkontis

novbakitan Esperantiston laborantan tie kiu petis min skribi leteron al lia Esperanto-amiko en Islando. Mi kompreneble kompleksis kaj samtempe komentis kia malgranda mondo, ĉu ne! Tre apude okazis unu el la modernaj Balkanaj militoj kaj la antikva milito famigita pro la Troja Ĉevalo. La pratempaj Grekaj dioj komenciĝis ne tre for de la ripozloko de la arkeo de Noa. Vere Turkio estas la lando de mistero, kiel Bahá'u'lláh priskribis ĝin. Por kristanoj la regiono estas sankta pro la predikado de mia pia samnomo.

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Kotizoj: Aŭstralia Esperanto-Asocio: Aŭ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: \$NZ \$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Kluboj: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, A., \$3.00 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30.00, mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1996 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita kaj enpaĝigita de Donald Broadribb per Macintosh LC III, la kompostoprogramo estis Claris Works Office. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt; kaj Orion Esperanto 16pkt (diponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Business Network, 5/25a Oxford Street, Bondi Junction NSW 2022.